
BULTENO 36 - 1956.




# VERDA VOĈO DE DOKSY

Bulteno de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy . Aperas laŭbezone.

## N I  E S T U  P R E P A R I T A J !

Ricevinte antaŭ kelkaj tagoj la revuon "Esperanto" mi tie legis kun intereso la artikolon de I.L."La danĝeroj de sukcesoj",el kiu sonas la samaj zorgoj kiel en mia artikolo "Kaj kio nun?" en la lasta V.V.La samajn zorgojn havis komitatanoj de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy dum sia kunveno en Praha,kie ili traktis pri nunjara aranĝo de SKED.Al tiuj,kiuj ne legis supre nomitajn artikolojn,mi devas klarigi la zorgojn,kiujn havas la konsciaj kaj eĉ respondecaj esperantistoj.

En la lasta tempo dank' al UEA, Esperanto rikoltas sukcesojn.Kaj eble tio sonas paradokse,la sukceso estas danĝera,jes danĝera tiam,se ĝi trovas homon nepreparita.Pasis jam idilia tempo,kiam oni en kluboj kulturis Esperanton pro Esperanto.Venas la tempo,kiam Esperanto komencas serioze ludi la rolon de "helpa lingvo internacia" kun ĉiuj praktikaj aspektoj. Ĝ i j a e s t i s  p o r  t i u  c e l o  k r e i t a ! Mi denove ripetas:ni devas esti praktikaj!Ni devas esti preparitaj por rikolti,kion ni kun granda laboro kaj oferemo semis.Venas la tempo,kiam la scipovo de Esperanto alportos ankaŭ la monan profiton al tiuj,kiuj ĝin lernis.Povas okazi, ke ĝi subite estos enkondukita en lernejojn,en grandajn entreprenojn ktp. La komitato de SKED pritraktis ĉiujn eventualaĵojn kaj decidis pri nova organizo de siaj kursoj.Estos aranĝita speciala kurso por E-instruistoj profesiaj kaj tiuj,kiuj volas fariĝi E-instruistoj.En tiu ĉi kurso estos ĉiuj preparataj por eventualaj ŝtataj ekzamenoj.

Estas necese gajni novajn adeptojn de Esperanto.Tiucele ĉiu esperantisto propagandu inter ne-esperantistoj la partoprenon en kursoj por komencantoj en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy.Tie ili ricevos lecionojn de E. laŭ gaja Ĉe-metodo.Speciale turnu vian atenton al instruistoj - fakuloj . Tiuj estos plej bezonataj,kiam venos decidiga tempo.

Tiuj,kiuj interesiĝas pri Ĉe-metodo havas okazon ĝin tie studi.Kompreneble estos aranĝataj ankaŭ konversacia kaj progresiga kursoj.Ankaŭ lecionoj pri oratora arto ne mankos.Tie dum diversaj diskutoj pri diversaj temoj /nur en Esperanto/ oni plej bone lernas elokventecon,rapidan pensadon rekte en la lingvo. En kursoj instruos fakuloj sub gvidado de konata pioniro kaj Akademiano D-ro Aug.Pitlík.

Aranĝu vian libertempon tiel,ke vi povu partopreni Someran Kolegion de Esperanto en Doksy de 15.VII. - 29.VII.1956. Ne preterpasu unikan okazon! /Adreso por informoj kaj aliĝoj: Somera Kolegio de Esperanto , D o k s y u Máchova jezera./

Ant.Slanina.